

Principoj de la Evangelio - La Personeco de la Patro kaj la Filo

Dio kreis homon laŭ sia bildo kaj simileco! La mallonga rakonto de la profeto Jozefo Smith pri lia interparolo kun la Patro kaj la Filo plifaciligas la instruojn de la Sankta Biblio pri tiu grava doktrino. La Biblio tute harmonias kun la vizio de Jozefo Smith kaj ni konsideru la instruojn Bibliajn pri la personeco de la Patro kaj de la Filo.

En Genezo ni legas, ke Dio mem diris, ke oni kreu homon laŭ Sia bildo (Genezo 1:26-27.) Dio kreis homon kiel viron kaj virinon, sed multaj teoriistoj klopodas ekspliki, ke tiu kreado estis nur spirita. Legante la vortojn de la Biblio kaj de Jozefo Smith pri lia vizio, ĉu povas ekzisti duboj? Ni scias ke Adam vivis pli ol 900 jarojn, laŭ la Biblio-rakonto, sed kiam li vivis 130 jarojn li havis filon "...laŭ lia bildo kaj lia simileco; kaj donis al li la nomon Set." (Genezo 5:3.) Moseo ankaŭ atestis pri la personeco de Dio. Kiam li kaj sepdek presbiteroj iris al la tabernaklo kaj ili "... vidis la Dion de Izrael ..." kaj tiu Dio parolis kun Moseo "vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kiel homo parolas kun sia amiko ..." (Eliro 33:9-11.) Dio parolis kun Moseo "vizaĝon kontraŭ vizaĝo, same kiel oni parolas kun amiko." Ĉu oni devas ekspliki kia maniere oni parolas kun amiko? Tio eblas nur ĉar Dio kreis homon laŭ Sia figuro kaj simileco. La apostolo Paŭlo klopodis ekspliki la personecon de Dio kaj diris al ni, ke Lia Filo, Jesuo Kristo, estis la "elbrilo de Lia gloro, kaj plena bildo de Lia substanco," kaj ke Li "sidiĝis dekstre de la Majesto" de Lia patro. (Heb. 1:3.) Tio, kompreneble nur eblas se Dio havus formon apud kiu Jesuo povus sidi. Kiam Stafano, la unua martiro, mortiĝis per ŝtonoj, li diris ke li rigardis la ĉielon malfermitan kaj vidis la gloron de Dio. Li ankaŭ vidis ke Jesuo staris apud la dekstra mano de Dio. (Agoj 7:55-56.)

Li vidis DU personojn; la Filon kiu staris dekstre de la Patro

Johano la Baptisto, baptis Jesuon per enakvigo. Kiam Jesuo forlasis la akvon, la ĉielo malfermis kaj la Spirito de Dio malsupren venis kiel kolombo. Oni ankaŭ aŭdis voĉon, kiu diris, "Ĉi tiu estas mia Filo, la amato, en kiu mi havas plezuron." Ĉi tie S. Mateo mencias TRI personojn; 1) Jesuo, kiu eliris la akvon; 2) la Sankta Spirito, kiu malsupreniris la ĉielon kiel kolombo; 3) la Patro, kies voĉon oni aŭdis el la ĉielo. Kiamaniere povas oni kredi ke tiuj tri individuaj personecoj povas esti nur unu persono sen korpo aŭ formo? Se Kristo ne havas korpon, ni konsideru lian releviĝon. Kiam Maria Magdalena kaj Maria vizitis la tombon de Kristo, ili vidis anĝelon kiu sidis apud la eniro de la tombo. La anĝelo diris, ke Jesuo ne estis tie, ke li releviĝis. (S. Mateo 28:3,5-6.) Post lia releviĝo, Kristo aperis al la dek unu apostoloj kiuj kunvenis en Jerusalemo. Ili kredis, ke estis spirito kiu aperis al ili. Kristo petis ke ili rigardu kaj tuŝu lin, ĉar spirito ne havas korpon kaj ostojn. (S. Luko 24:36-39.) Kristo ankaŭ manĝis fiŝon kaj mielĉelaron por pruvi, ke li havis korpon. Kun sia releviĝinta korpo, Kristo aperis al 500 personoj. (I Kor. 15:6.) La apostoloj ankaŭ vidis ke Kristo supreniris la ĉielon. (Agoj 1:10-11.) Se Jesuo estas nur spirita parto de la Patro, sen korpo kaj formo, tiom granda, ke li plenigas la universon, sed ankaŭ tiom malgranda, ke li plenigas ĉiun koron, kion

signifas la releviĝo, kion oni festas ĉiun Paskon en la kristanaj eklezioj, kaj kion faris Kristo kun lia korpo post kiam li ĝin montris al liaj apostoloj kaj al aliaj personoj?

Estas miskomprenoj pri la personeco de Dio. En S. Johano 1:18, oni legas ke neniu iam vidis Dion, kaj en I Johano 4:12 ke neniu vidis Dion, sed se ni amas unu la alian, Dio loĝas en ni. En la inspirita versio de la Biblio, (kion ni uzas kiel referenco) ni legas ke neniu iam vidis Dion, krom tiuj, kiuj atestas pri la Filo, (S. Johano 1:19) kaj neniu iam vidis Dion, krom tiuj kiuj kredas. (I Johano 4:12.)

La kompreno de la profeto de la profeto Jozefo Smith montras, ke ni povas vidi Dion se ni havas la Spiriton. S. Johano ankaŭ skribas tion en S. Johano 5:45-46. Paŭlo parolis pri Dio kiel "nevidebla Dio." (Kol. 1:14-15.) Pluaj studoj de la instruoj de Paŭlo indikas de li havas la saman komprenon pri Dio kiel Johano. Dio nevideblas al la profetoj. Paŭlo indikis ke Moseo vidis la "nevideblan Dion." (Hebreoj 11:27.)

Se neniu vidis Dion, kion vidis Moseo, kaj aliaj? Johano ankaŭ mencias, ke Dio estas spirito, kaj tio konfuzas multajn personojn. (S. Johano 4:24.) Tio ne konfuzas nin, ĉar ni estas spiritoj, vestitaj de korpoj de haŭto kaj ostoj. Johano diris ke ni "adoru Dion en la spirito kaj en la vero..." Tio ne signifas, ke nia spirito forlasu la korpon por ke ne povu adori Dion "en la spirito." Paŭlo ankaŭ diris, ke tiuj, kiuj unuiĝas al la Eternulo estas unu spirito. (I Kor. 6:17.) Ni estas spiritoj same kiel Johano diris kiam li skribis, ke "Dio estas spirito."

Estas multe da miskompreno pri la doktrino, ke Jesuo kaj la Patro estas unu. Se oni legas la deksepan ĉapitron de Johano, tio klarigas la aferon. Kiam Kristo mortis li dankis al sia Patro por la apostoloj kaj petis, "ke ili estu unu, tiel same kiel ni." (S. Johano 17:11.) Poste li preĝis por tiuj kiuj kredas je li (Kristo) pro ilia vorto; ke ili ĉiuj estu unu, kiel la Patro estas en Kristo, kaj Kristo en la Patro, ke ili estu unu en la Patro kaj la Filo, por ke la mondo kredu de la Patro sendis la Filon al la tero. (S. Johano 17:20-21.)

Videblas ke Jesuo ne parolis pri unueco de personeco, sed de celo. Ne necesus, ke Kristo preĝu al la Patro se la unueco pri kiu li preĝis estis pri personeco anstataŭ celo. Kristo ankaŭ preĝis, ke tiuj, kiujn la Patro donis al li estis kune kiel li estas; ke ili vidu la gloron, kiun la Patro donis al li, ĉar la Patro amis lin antaŭ la fondo de la mondo. (S. Johano 17:24.) Denove videblas ke la unueco ne estas de personeco, ĉar se Kristo kaj la Patro estus unu persono, kial preĝus Jesuo al si mem, kaj ke li amis sin mem antaŭ la fondo de la mondo! Kristo diris ke la eterna vivo estas, ke homoj konu la veran Dion, kaj Jesuon Kriston, kiun Dio sendis. (S. Johano 17:3.) Ĉi tiu vera kono de Dio kaj Jesuo Kristo, Lia Filo, denove estas sur la tero, ne nur pere de Biblia studado, sed per la apero de tiuj ĉielaj personoj al la juna profeto Jozefo Smith, kiel li atestas.